

ANTON PANNEKOEK

# SINDIKATISMO SOVETOJ



La Juna Penco  
F 47340 Laroque Timbaut  
134B \* 1980 \* 3 FF

## L A S I N D I K A T I S M O

\*\*\*\*\*

Tiu ĉi teksto aperis en "International Council Correspondence", vol. II, n-ro 2, januaro 1936 (redaktita de Anton Pannekoek sub la pseŭdonomo J. Harper).

Tradukis Kribo, 1979.

Kiel lukti devas la laborista klaso por supervenki la kapitalismon ? Jen la ĉefa demando, kiu ĉiutage staras antaŭ la laboristoj. Kiujn efikajn agrimedojn kaj kiujn taktikojn ili devos uzi por konkuri la potencon kaj venki la malamikon ? Ekzistas neniu scienco, neniu teorio, kapabla ekzakte montri al ili la sekvendan vojon. Nur palpe, lasante esprimi sian instinkton kaj sian spontanon, ili trovos la vojon. Ju pli disvolviĝas kaj disvastiĝas la kapitalismo tra la mondo, des pli kreskas la potenco de l'laboristoj. Novaj, pli taŭgaj agrimedoj aldoniĝas al la malnovaj. La klasbatalaj taktikoj nepre devas adaptiĝi al la socia evoluo. La sindikatismo aspektas kiel la primitiva formo de l'laborista movado en stabila kapitalisma sistemo. La sendependa laboristo estas sendefenda fronte al la kapitalista dungisto. Tial la laboristoj organiziĝis en sindikatoj. La sindikato arigas la laboristojn en la kolektiva agado kaj uzas la strikon kiel ĉefan armilon. Tiel pli-malpli realiĝas potenco-ekvilibro ; okazas eĉ, ke ĝi pli forte kliniĝas flanke de l'laboristoj, tiel ke la izolitaj etdungistoj troviĝas senpovaj antaŭ la gravaj sindikatoj. Tial, en

la landoj, kie plej disvolviĝis la kapitalismo, la laboristaj sindikatoj kaj la mastraj asocioj, trustoj, societoj, senĉese interbataladas.

En Anglio naskiĝis la sindikatismo paralele kun la unuaj vivsignoj de l'kapitalismo. Poste ĝi etendiĝis al la aliaj landoj, kiel fidela kunulo de l'kapitalismo. Ĝi ĝuis apartajn kondiĉojn en Usono, kie la amaso da liberaj kaj senhomaj teritorioj, kiuj disponeblis por la pioniroj, drenis la laborpretajn homojn ekster la urbojn ; sekve, la laboristoj ĝuis altajn salajrojn kaj relative bonajn laborkondiĉojn. La Usona Laborista Federacio konsistigis veran forton en la lando kaj plejofte kapablis daŭre teni relative altan vivnivelon por la al ĝi aliĝintaj laboristoj.

En tiaj kondiĉoj, la ideo renversi la kapitalismon ne povis ĝermi en la menso de la usonaj laboristoj. La kapitalismo proponis al ili stabilan kaj komfortan ekzistadon. Ili ne konsideris sin kiel apartan klason, kies interesoj kontraŭus la ekzistantan ordon ; ili estis el ĝi konsistigaj eroj kaj konsciis, ke ili povas atingi ĉiujn eblojn, kiujn havigas al ili kapitalismo disvolviĝanta sur nova kontinento. Estis sufiĉe da loko por akcepti milionojn da individuoj, plejmulte eŭropanaj. Endis proponi al tiuj milionoj da farmistoj disvolviĝantan industrion, en kiu la laboristoj, montrante energion kaj bonvolon, povos altiĝi ĝis la rango de liberaj metiistoj, de etaj aferistoj aŭ eĉ de riĉaj kapitalistoj. Ne estas surprizige, ke la usona laborista klaso estis saturita de vera kapitalista spirito.

Same okazis en Anglio. Certiginte al si la monopolon de l'tutmonda merkato, la regadon super la internaciaj merkatoj kaj la posedon de riĉaj kolonioj, Anglio amasigis konsiderindajn riĉaĵojn. La kapitalista klaso, kiu ne estis devigata batali por akiri sian profitparton, povis konsenti al la laboristoj relative komfortan vivmanieron. Kompreneble, ĝi devis trapasi

kelkajn batalojn antaŭ ol rezignacii pri tia sinteno, sed ĝi rapide komprenis, ke, lasante ekzistorajton al la sindikatoj kaj garantiante la salajrojn, ĝi certigos la pacon en la fabrikoj. Do, siavice la anglan laboristan klason stampis la kapitalista spirito.

Ĉio ĉi ja bone harmonias kun la vera karaktero de l'sindikatisma, kies postuloj neniam celas transe de l'kapitalismo. La sindikatisma ne celas anstataŭigi la kapitalisman sistemon per alia produktadmaniero, sed plibonigi la vivkondiĉojn en la sino mem de l'kapitalismo. La esenco de l'sindikatisma ne estas revolucia sed konservativa.

La sindikatisma agado nature estas parto de l'klasbatalo. La kapitalismo staras sur klasantagonismo, tial, ĉar la laboristoj kaj la kapitalistoj havas kontraŭajn interesojn. Tio veras ne nur pri tio rilatanta la pluvivon de l'kapitalisma reĝimo, sed ankaŭ pri tio rilatanta la dispartigon de l'kruda nacia produktado. La kapitalistoj strebas pliigi siajn profitojn - la plusvaloron - malpliigante la salajrojn kaj pliigante la nombron da laborhoroj aŭ la laborkadencon. Siaflanke, la laboristoj strebas pliigi siajn salajrojn kaj malpliigi siajn laborhorojn. La prezo de ilia laborforto ne estas determinita kvanto, kvankam ĝi devas superi tion necesan al individuo por ne malsatmorti ; kaj la kapitalisto ne propravole pagas. Tiu antagonismo tiel naskas postulojn kaj la veran klasbatalon. La tasko kaj la rolo de l'sindikatoj estas daŭrigi la luktadon.

La sindikatisma estis la unua lernejo de l'proletaro ; ĝi instruis al la proletaro, ke la solidaro situas en la centro de la organizita batalo. Ĝi estis la unua organizformo de la laborista potenco. Tiu karaktero ofte fosiliĝis en la unuaj anglaj kaj usonaj sindikatoj, kiuj degeneris en nurajn korporaciojn :

tipe kapitalisma evoluo. Ne same okazis en la landoj, kie la laboristoj devis batali por sia pluvivo, kie, malgraŭ ĉiuj siaj strebadoj, la sindikatoj ne povis akiri plibonigon de l'viv-nivelo, kaj kie la plene disvolviĝanta kapitalisma sistemo uzis sian tutan energion por lukti kontraŭ la laboristoj. En tiuj landoj la laboristoj devis lerni, ke nur la revolucio povos definitive savi ilin.

Ekzistas do diferenco inter la laborista klaso kaj la sindikatoj. La laborista klaso devas rigardi trans la kapitalismon, dum la sindikatismo estas tute izolita en la limoj de l'kapitalisma sistemo. La sindikatismo povas speguli nur parton, necesan sed tre etan, el la klasbatalo. Disvolviĝante, ĝi nepre devas ekkonflikti kontraŭ la laborista klaso, kiu mem volas iri pli malproksimen.

La sindikatoj kreskas laŭmezure kiel disvolviĝas la kapitalismo kaj la granda industrio, ĝis ili fariĝas gigantaj organizoj kun miloj da anoj, disvastiĝas tra tuta lando kaj havas branĉojn en ĉiu urbo kaj en ĉiu uzino. Oni nomas funkciulojn: prezidantojn, sekretariojn, kasistojn, kiuj gvidas la aferojn, prizorgas la financon, tiel ĉe la loka ŝtupo kiel ĉe la supro. Tiuj funkciuloj estas la sindikataj estroj. Ili gvidas la intertraktadojn kun la kapitalistoj, tasko por kiu ili fariĝis lertuloj. La prezidanto de sindikato estas eminenta persono, kiu rilatas kiel egalulo kun la kapitalista dungisto kaj pridiskutas kun li la interesojn de l'laboristoj. La funkciuloj estas fakuloj pri sindikata laboro, dum la sindikatanaj laboristoj, absorbitaj de sia laboro en uzino, povas nek pristudi nek gvidi mem.

Tia organizo ne plu estas nura laborista grupo; ĝi konsistigas organizitan organismon, kiu havas proprajn politikon, karakteron, menson, tradiciojn kaj funkciojn. Ĝiaj interesoj diferencas de tiuj de la laborista klaso, kaj, por defendi ilin, ĝi evitos nenium batalon. Eĉ se iam la

sindikatoj perdis sian utilon, ili tamen ne malaperus pro tio. Ilia financo, ilia membraro, iliaj funkciuloj estas realaĵoj, kiuj certe ne estas dissolviĝontaj subite.

La sindikataj funkciuloj, la estroj de l' laborista movado, estas la gardantoj de la apartaj interesoj de l'sindikatoj. Malgraŭ sia laborista deveno, ili akiras, post longaj jaroj da sperto ĉe la gvidado de la organizo, novan socian karakteron. En ĉiu socigrupo, kiu fariĝas sufiĉe grava por konsistigi apartan grupon, la naturo de l'laboro modlas kaj determinas la pens- kaj ag-manierojn. La rolo de la sindikatistoj ne samas tiun de l'laboristoj. Ili ne laboras en uzino, ili ne estas ekspluatataj fare de la kapitalistoj, ili ne riskas senlaboron. Ili sidas en skribĉambroj, ĉe relative stabilaj postenoj. Ili pridiskutas sindikatajn temojn, parolas en la laboristaj kunvenoj kaj intertraktas kun la mastroj. Komprenoble, ili devas stari flanke de l'laboristoj, kies interesojn kaj postulojn ili devas defendi kontraŭ la kapitalistoj. Sed pri tio ilia rolo ne multe diferencas de tiu de la advokato de iu ajn organizo.

Estas tamen diferenco, ĉar la plimultaj sindikatestroj, devenante el la vicoj de la laborista klaso, mem spertis la kapitalistan ekspluatadon. Ili konsideras sin kiel parton de la laborista klaso, kies korporaciemo ne baldaŭ estingiĝos. Tamen ilia nova vivmaniero tendencas malfortigi ĉe ili tiun pratradicion. Sur la ekonomia kampo ilin oni ne plu povas konsideri kiel proletojn. Ili interiras kapitalistojn, intertraktas kun ili pri la salajroj kaj la laborhoroj, dum ĉiu tendaro montras la valoron de la propraj interesoj, ambaŭ rivalante kvazaŭ du kapitalistaj entreprenoj. Ili lernas koni la vidpunkton de l' kapitalistoj same kiel tiun de l'laboristoj; ili havas zorgojn pri "la interesoj de l'in-

dustrio" ; ili provas agi kiel perantoj. Povas esti esceptoj ĉe la individua nivelo, sed ĝenerale, ili ne povas havi tiun senton pri klasaparteno, kiun havas la laboristoj, kiuj ja ne penas kompreni nek taksu la interesojn de l'kapitalistoj, sed luktas por siaj propraj interesoj. Sekve, la sindikatistoj nepre ekkonfliktas kontraŭ la laboristoj.

En la evoluintaj kapitalismaj landoj la sindikatestroj estas sufiĉe multnombraj por konsistigi apartan grupon kun apartaj karaktero kaj interesoj. Kiel reprezentantoj kaj estroj de l'sindikatoj, ili enkarnigas la karakteron kaj la interesojn de tiuj sindikatoj. Tial ke la sindikatoj estas per si mem ligitaj kun la kapitalismo, iliaj estroj konsideras sin kiel elementojn nepre necesajn al la kapitalisma socio. La kapitalismaj funkcioj de la sindikatoj konsistas en solvado de la klas-konfliktoj kaj en certigado de la paco en la uzinoj. Konsekvence, la sindikatestroj konsideras, ke estas ilia civitana devo klopodi por la pludaŭrado de la paco en la uzinoj kaj interveni en la konfliktojn. Ili neniam rigardas trans la kapitalisman sistemon. Ili estas tute je la servo de l'sindikatoj kaj ilia ekzisto estas nedisigeble ligita kun la celaro de l'sindikatismo. La sindikatoj estas por ili la plej esencaj organoj de la socio, la nura fonto de sekuro kaj potenco; pro tio oni devas ilin defendi per ĉiuj eblaj rimedoj.

Koncentrante la kapitalojn en potencaj entreprenoj, la mastraro troviĝas en superanta pozicio fronte al la laboristaro. La industriaj potenculoj regas kiel absolutaj monarkoj super la laboristaj amasoj, kiujn ili plutenas sub sia dependeco kaj al kiuj ili malhelpas aliĝi al la sindikatoj. Ifoje okazas, ke tiuj sklavoĵoj de l'kapitalismo ribelas kontraŭ siaj mastroj kaj ekstrikas, ke ili postulas pli bonajn laborkondiĉojn, malpli pezajn horarojn, la rajton organiziĝi. La sindikatistoj ekhelpas ilin. Tiam ekuzas la mastroj sian soci-politikan potencon. Ili eluzinigas



la strikantojn, mortigas ilin pere de milicoj aŭ dungsoldatoj, enkarcerigas iliajn delegitojn, deklaras nelegaj iliajn helpkasojn. La kapitalista gazetaro parolas pri haoso, murdo, revolucio, kaj incitas la publikan opinion kontraŭ la strikantoj. Post pluraj monatoj da obstino kaj da heroaj suferoj, lacegaj kaj elrevigitaj, nekapablaj cedi la ŝtalan strukturon de l'kapitalismo, la laboristoj kapitulacas, prokrastante siajn postulojn.

La koncentrado de l'kapitaloj malfortigas la pozicion de l'sindikatoj, eĉ en la korporacioj, kie ili estas plej potencaj. Malgraŭ sia graveco, la solidarkasoj de la strikantoj aspektas tre etaj kompare kun la financaj rimedoj de la kontraŭanto. Unu aŭ du lokaŭtoj sufiĉas por ilin tute sekigi. Tiam la sindikato ne kapablas lukti, eĉ en la kazo, kiam la mastro decidis redukti la salajrojn kaj pliiĝi la laborhorojn. Ĝi povas nur cedi al la mastraj kondiĉoj kaj ĝia lerto por intertrakti neniel helpas ĝin. Ĝuste tiam komenciĝas la zorgoj, ĉar la laboristoj volas batali. Ili rifuzas cedi sen batali kaj ili scias, ke ili riskas perdi malmulton, se ili ribelas. Male, la sindikatestroj riskas multon perdi: la financa potenco de l'sindikatoj kaj eĉ foje ilia ekzisto mem estas minacataj. Ili do ĉiel provos malebligi batalon, kiun ili konsideras senelira. Kaj ili provos konvinki la laboristojn, ke estas ilia intereso konsenti la mastrajn kondiĉojn. Tiel ke, lastekzame, ili agas kvazaŭ delegitoj de la kapitalistoj. Ankoraŭ pli grava estas la situacio, kiam la laboristoj persiste volas plubatali sen atenti la ordonojn de l'sindikatoj. Tiukaze, la sindikata potenco turnas sin kontraŭ la laboristojn.

La sindikatestro tiel fariĝas sklavo de sia funkcio - la plutenado de paco en la uzinoj - kaj tio malprofite al la laboristoj, kvankam li pretendas plejeble bone defendi iliajn in-



teresojn. Ĉar li ne povas rigardi trans la kapitalisman sistemon, pravas li, laŭ sia kapitalisma vidpunkto, opinii, ke ne utilas la lukto. Tie situas la limoj de lia potenco kaj tion devas pritrakti la kritiko.

\* \* \*

Ĉu ekzistas alia elirvojo ? Ĉu la laboristoj povas esperi ion gajni per sia batalo ? Ege probable, ke ili ne akiros tujajn kontentigojn, sed ili gajnos alion, ĉar, rifuzante submetiĝi sen batali, ili hardas la ribelemon kontraŭ la kapitalismo. Ili esprimas novajn postulojn, kaj tiam iĝas nepre necesa la subteno de la tuta laborista klaso. Endas, ke ili montru al ĉiuj laboristoj, ke ne estas espero por ili interne de la kapitalismaj strukturoj, kaj ke ili povos venki nur se unuigintaj, ekster la sindikatoj. Tie komenciĝas la revolucia luktado. Kiam ĉiuj laboristoj komprenos tiun lecionon, kiam strikoj samtempe ekos en ĉiuj industriaj fakoj, kiam ondo da ribelo invados la landon, tiam eble ekaperos iom da dubo en la arogantaj koroj de l'kapitalistoj ; vidante sian ĉiopovecon minacata, ili konsentos kelkajn cedojn.

La sindikatestro ne povas kompreni tiun vidpunkton, tial ke la sindikatismo ne povas rigardi trans la kapitalismon. Li povas nur kontraŭi tian batalon, kiu riskas lin pereigi. Sindikatoj kaj mastroj estas unuigitaj en sia komuna timo pro proletara ribelado.

Kiam la sindikatoj batalis kontraŭ la kapitalistaro por akiri pli bonajn laborkondiĉojn, tiu ĉi malamis ilin, sed ne havis la kapablon ilin tute detruiri. Se hodiaŭ la sindikatoj provus re-veki la batalemon de la laboristaro, ili estus senkomplete persekutataj far la reganta klaso, kiu repremus iliajn agadojn, sendus sian milicon por detruiri iliajn sidejojn, enkarcerigus iliajn estr-ojn kaj kondamnos ilin al monpuno, konfiskus ilian kason. Se, inverse, ili malhelpus al siaj anoj batali, ili estus konsiderataj de la kapitalistaro kiel havindaj institucioj ; ili estus protektataj kaj iliaj estroj estus konsiderataj kiel merito-

plenaj civitanoj. La sindikatoj tiel troviĝas disŝirataj inter du malbonoj : unuflanke, la persekutoj - ja tre malĝojiga sorto por homoj, kiuj pretendas sin pacemaj civitanoj -, aliflanke, la ribelado de la sindikatanaj laboristoj, kiuj minacas skui la sindikatan organizon en ties fundamento. Se la reganta klaso estas sagaca, ĝi agnoskos la utilon de ŝajn-batalo, se ĝi volas, ke la sindikatestroj konservu ian influon sur sia membraro.

Neniu respondecas tiujn konfliktojn : ili estas la nepra konsekvenco de la disvolviĝo de l'kapitalismo. Vivas la kapitalismo, sed ĝi estas ankaŭ sur la vojo al sia pereco. Ĝi devas esti kontraŭbatalata samtempe kiel vivantaĵo kaj kiel transirantaĵo. La laboristoj devas samtempe lukti senĉese por akiri pli altajn salajrojn kaj pli bonajn laborkondiĉojn, kaj ekkonscii la komunismajn idealojn. Ili alkroĉiĝas al la sindikatoj, kiujn ili taksas ankoraŭ necesaj, samtempe provante de tempo al tempo fari el ili pli bonajn batalilojn. Sed ili ne havas la saman vidpunkton kiel la sindikatismo, kiu restas esence kapitalisma.

La konfliktoj, kiuj kontraŭstarigas la kapitalismon al la klasbatalo, estas hodiaŭ reprezentataj de la fosaĵo, kiu disigas la sindikatisman spiriton - enkarnigitan ĉefe de la sindikatestroj - disde la sinteno, ĉiutage pli kaj pli revoluciema - de la sindikatanaro. Evidentiĝas tiu fosaĵo, ĉiufoje kiam stariĝas sufiĉe grava politika aŭ socia problemo.

La sindikatismo estas intime ligita kun la kapitalismo ; ĝuste en prospera periodo ĝi havas pli da ŝancoj, ke ĝiaj salajraj postuloj estos akceptitaj. Tiel ke, en periodo de ekonomia krizo, ĝi devas deziri, ke la kapitalismo rekomencu sian disvolviĝon. La laboristoj, kiel klaso, ne multe cerbumas pri la glata irado de la aferoj. Efektive, ĝuste kiam

la kapitalismo plej malfortas, tiam ili havas plej da ŝancoj por ataki ĝin, arigi siajn fortojn kaj fari unuan paŝon al libero kaj revolucio.

La kapitalismo superrege disvastiĝas eksterlanden, kaptante siaprofite naturajn riĉaĵojn de aliaj landoj. Ĝi konkeras koloniojn, servutiĝas la primitivajn popolojn kaj ekspluatas ilin, senhezite farante la plej aĉajn teruraĵojn. La laborista klaso denuncas kaj kontraŭbatalas la kolonian ekspluatadon, dum la sindikatismo ofte subtenas la koloniisman politikon, fonton de prospero por la kapitalismo.

Laŭmezure kiel kreskas la kapitalo, okazas amasaj investadoj en la kolonioj kaj alilande : merkatoj por la granda industrio kaj produktantoj de krudmaterialoj, ili fariĝas ege gravaj. Por akiri tiujn koloniojn la grandaj kapitalismaj ŝtatoj interbatalas por akiri influon kaj tiel dispartigas la mondon inter si. La mezklasoj lasas sin alpeli al tiuj imperiismaj konkeroj nome de la nacia grandeco. Poste, la sindikatoj siavice aprobas la regantan klason, pretekstante ke la prospero de ilia lando dependas de la sukcesoj, kiujn ĝi gajnas en la imperiisma lukto. Siaflanke, la laboristoj konsideras la imperiismon nur kiel manieron pliigi la potencon kaj la brutalecon de iliaj subpremantoj.

Tiu interes-konkurado inter la kapitalismaj nacioj transformiĝas en verajn militojn. La mondmilito kronas la imperiisman politikon. Por la laboristoj ĝi signifas ne nur la finon de la internacia solidaro, sed ankaŭ la plej krudan formon de la ekspluatado. Ĉar la laboristaro, plej grava kaj plej ekspluatata sociklaso, estas la unua trafita de la milit-abomenaĵoj. La laboristoj devas liveri ne nur sian laborforton, ili krome devas foroferi sian vivon.

Kaj tamen, dum militperiodo la sindikatismo povas stari nur flanke de l'kapitalismo. Ĉar ĝiaj interesoj estas ligitaj kun tiuj de l'kapitalismo, ĝi povas nur deziri ties venkon. Ĝi

klopodas do reveki la naciistajn instinktojn kaj la ŝovinismon. Ĝi helpas la regantan klason por peli la laboristojn en la militon kaj repremi ĉian kontraŭstaron.

La sindikatismo abomenas la komunismon, kiu prezentas ĉiaman minacon kontraŭ ĝia ekzisto mem. En komunisma reĝimo ne estas mastroj, do nek sindikatoj. Kompreneble, en la landoj, kie ekzistas potenca socialista movado kaj kie la granda plimulto el la laboristaro estas socialista, ankaŭ la estroj de tiu laborista movado devas esti socialistoj. Sed temas ja tie pri dekstraj socialistoj, kiuj limigas sin, dezirante respublikon, en kiu honestaj sindikataj estroj venus anstataŭi ĉe la organizado de l' produktado la profitavidajn kapitalistojn.

La sindikatismo abomenas la revolucion, kiu renversas la rilatojn inter mastroj kaj laboristoj. Dum la efektiviĝo de siaj brutalaj kunpuŝiĝoj la revolucio subite forbalaas la regularojn kaj la konvenciojn, kiuj regas la laboron; ĉe ĝiaj gigantaj potenc-elmontradoj la modestaj intertraktad-talentoj de la sindikatestroj estas superataj. Tial la sindikatismo mobilizas ĉiujn siajn fortojn por kontraŭstari la revolucion kaj la komunismon.

Tiu sinteno estas signifoplena. La sindikatismo estas vera potenco. Ĝi disponas konsiderindajn monrimedojn kaj moralan influon zorge flegatan en siaj diversaj eldonaĵoj. Tiu potenco estas koncentrita en la manoj de l'sindikatestroj, kiuj uzas ĝin ĉiufoje kiam la apartaj intereso de l'sindikatoj ekkonfliktas kontraŭ tiuj de la laboristaro. Kvankam ĝi estis konstruita far kaj por la laboristoj, la sindikatismo superregas la laboristojn, sammaniere kiel la registaro regas la popolon.

La sindikatismo varias laŭ la landoj kaj la formo de l'kapitalisma disvolviĝo. Ĝi povas evolui ankaŭ interne de certa lando. Okazas,

ke sindikatoj perdas el sia potenco kaj ke la batalemo de la laboristoj redonas al ili vivon aŭ eĉ transformas ilin ĝisfunde. En Anglio, en la jaroj 1880-90, "nova sindikatismo" tiel ŝpruce aperis el la malriĉularo, la dokistoj kaj aliaj nefakaj kaj subpagataj laboristoj, kaj rejunigis la sklerozigintajn strukturojn de la malnovaj sindikatoj. La pliiĝo de l'nombro da manlaboristoj vivantaj en plorindaj kondiĉoj estas unu el la konsekvencoj de la disvolviĝo de l'kapitalismo, kiu senĉese kreas novajn industriojn kaj anstataŭigas la faklaboristojn per maŝinoj. Kiam, pelate al lasta saveblo, tiuj laboristoj ekiras sur la vojo de l'ribelo kaj de l'striko, tiam ili fine akiras klaskonscion. Ili remodlas la strukturojn de l'sindikatismo por adapti ĝin al pli aktuala formo de l'kapitalismo. Kompreneble, kiam la kapitalismo transiras tiun sojlon, la nova sindikatismo ne povas eskapi la sorton de ĉiu ajn formo de sindikatismo kaj siavice ĝi naskas internajn kontraŭaĵojn. La nova sindikatismo manifestis sin aparte en Usono kun la I.W.W. (International Workers of the World - Internaciaj Laboristoj de l'Mondo), naskitaj de du formoj de kapitalisma disvolviĝo. En la vastaj arbaraj kaj ebenaj regionoj de l'Okcidento, la kapitalistoj ekrabis naturajn riĉaĵojn per brutalaj metodoj, al kiuj rebatis la laboristoj-aventuristoj per perforto kaj sovaĝeco. Male, en la orienta parto de Usono, la industrio disvolviĝis per la ekspluatado de milionoj da malriĉaj enmigrintoj, venintaj el landoj kun malalta vivnivelo, kaj kiuj devis suferi mizerajn laborkondiĉojn.

Por lukti kontraŭ la strikte korporacia spirito de l'malnova usona sindikatismo - la Usona Labor-Federacio, kiu disigis la laboristojn de uzino en plurajn apartigitajn sindikatojn - la I.W.W. proponis, ke ĉiuj samuzinaj laboristoj unuigu kontraŭ sia mastro interne de ununura sindikato. Kondamnante la etkverelojn, kiuj kontraŭstarigis unujn sindikatojn kontraŭ la aliaj, la I.W.W. postulis solidaron inter ĉiuj laboris-

toj. Dum la faklaboristoj, bone pagataj, malŝate rigardis la neorganizitajn novajn enmigrantojn, la I.W.W. sin turnis al tiu plej mizera parto de la proletaro kaj instigis ĝin al luktado. Ili estis tro malriĉaj por pagi altajn kotizojn kaj konsistigi tradiciajn sindikatojn. Sed kiam ili ribelis kaj ekstrikis, la batalmanieron instruis al ili la I.W.W., kiuj kolektis monhelpon en la tuta lando kaj defendis ilian celon en sia gazetaro kaj en la tribunaloj. Ade venkinte, ili injektis al tiuj amasoj organizemon kaj responsemon. Kaj dum la malnovaj sindikatoj fidis pri sia monriĉeco, la I.W.W. sin apogis sur la solidaro, la entuziasmo kaj la persistemo de la laboristoj. Anstataŭ la rigida strukturo de l'malnovaj sindikatoj, la I.W.W. proponis fleksiblan organizformon, kvante variantan laŭ la situacio, kun malmulta anaro dum pacperiodo, disvolvigantan samtempe kun la lukto. Rifuzante la kapitalismemon kaj konservativemon de la usona sindikatismo, la I.W.W. laŭdegis la revolucion. Iliaj membroj estis senkompate persekutataj fare de la tuta kapitalistaro. Ilin oni enkarcerigis kaj torturis surbaze de falsaj akuzoj. La usona juro eĉ elpensis novan delikton : "la kriman sindikatismen".

Kiel rimedo lukti kontraŭ la kapitalisma socio, la industria sindikatismo ne povas, sola, sufiĉi por renversi tiun socion kaj konkeri la mondon por la laboristoj. Ĝi kontraŭbatalas la kapitalismen en ĝia mastrara formo, en la ekonomia sektoro de la produktado, sed ĝi ne povas ataki ĝian politikan fortikaĵon, la ŝtatan potencon. Tamen, la I.W.W. estis ĝis nun la plej revolucia organizformo en Usono. Pli ol iu ajn ĝi kontribuis veki la klaskonscion, la solidaron kaj la unuecon de l'proletaro, postuli la komunismen kaj akriigi siajn batalilojn.

La sindikatismo ne povas finvenki la kapitalismen. Jen kion oni konkludu el tio ĵus

skribita. La venkoj, kiujn ĝi atingas, alportas nur etdaŭrajn solvojn. Sed tamen gravas tiuj sindikataj luktoj kaj ili devos pluokazi ĝis la fino, ĝis la fina venko.

Neniel surpriziga estas la senpoveco de l' sindikatismo, tial ĉar, se izolita laborista grupo povas aspekti en avantaĝa pozicio, kiam ĝi kontraŭstaras izolitan mastraron, ĝi estas senpova fronte al mastro, kiun subtenas la tuta kapitalista klaso. Ĝuste tio okazas nuntempe (1935, Ndt) : la ŝtata potenco, la financa potenco de l' kapitalismo, la burĝa publika opinio, la akreco de la kapitalista gazetaro, kunagas por venki la grupon da batalemaj laboristoj.

Dume, la tuta laborista klaso ne sentas sin koncernata pri lukto de strikantararo. Kompreneble, la laborista plimulto neniam malamikas al striko ; ĝi eĉ povas entrepreni monkollektadon por subteni la strikantojn - kondiĉe ke tiu ne estu malpermesata de tribunala ordono . Sed tiu simpatio ne iras pli malproksimen : la strikantoj restas solaj, dum milionoj da laboristoj observas ilin pasive. Kaj la lukton oni ne povas gajni (krom en la apartaj kazoj, kiam la mastraro decidas, pro ekonomiaj kialoj, kontentigi iujn postulojn), tiel longe dum la tuta laborista klaso ne unuiĝas en tiu batalo.

Malsamas la situacio, kiam la laboristoj sentas sin rekte implikitaj en la lukto ; kiam ili ekkomprenas, ke temas pri ilia estonteco. Ekde kiam la striko disvastiĝas al la tuta industrio, la kapitalisma potenco devas alfronti la kolektivan potencon de la laborista klaso.

Oni ofte diris, ke la disvolviĝo de la striko kaj ĝia disvastiĝo al la tuta aktivaro de iu lando estas la plej fidinda rimedo por certigi la venkon. Sed endas atenti, ke tiu taktiko ne estas praktika procezo ĉiumomente uzenda kun sukceso. Se tiel estus, la sindikatismo certe estus uzinta ĝin senĉese. La ĝeneralan strikon



oni ne povas dekreti, laŭ la humoro de la sindikatestroj, kiel nuran taktikon. Ĝi povas naskiĝi nur el la koro mem de la laborista klaso, kiel la esprimo de ties spontaneco ; kaj ĝi povas okazi nur, kiam la celo de l' batalo multe superas la simplajn postulojn de nura grupo. Tiam, la laboristoj vere metos ĉiujn siajn fortojn, sian entuziasmon, sian solidaron kaj sian persistemon en la batalon.

Kaj ili ja bezonas ĉiujn siajn fortojn, ĉar la kapitalismo siavice mobilizos siajn plej bonajn armilojn. Unuastadie, ĝi povos esti surprizita per tiu subita elmonro de la proletara potenco kaj devigata al cedo. Sed tio estos ja nur portempa retiriĝo. La venko de l' proletaro estas nek certigita nek longdaŭra. Ĝia vojo ne estas klare fiksita, sed devas esti tratrita per egaj fortostreĉoj tra la kapitalisma ĝangalo.

Tamen, ĉiu venketo estas en si progreso. Ĉar ĝi kuntrenas ondon da laborista solidaro : la amasoj ekkonscias pri la forto de sia unueco. Per la agado la laboristoj pli bone komprenas, kion signifas la kapitalismo kaj kio estas ilia pozicio rilate al la reganta klaso. Ili ekvidas la vojon al libero.

Tiel la lukto eliras el la malvastega kampo sindikatisma por eniri en la vastan kampon de la klasbatalo. Tiam venas la momento, kiam la laboristoj mem ŝanĝiĝas. Ili devas larĝigi sian mondkoncepton kaj rigardi trans la uzinmurojn al la tuto de l'socio. Ili devas altiĝi super la ĉirkaŭanta malnobleco kaj alfronti la Ŝtaton. Tiam ili penetras en la reĝolandon de la politiko. Estas tempo ekzorgi pri la revolucio.

A.P.

-----

## L A S O V E T O J

\*\*\*\*\*

El "International Council Correspondence",  
vol. II, n-ro 5, aprilo 1936 (redaktita de  
Anton Pannekoek sub la pseŭdonomo J. Harper).  
Tradukis Kribo, 1979.

La luktanta laborista klaso bezonas organizon, kiu permesu al ĝi kompreni kaj diskuti, per kiu ĝi povu fari decidojn kaj sukcesigi ilin kaj dank'al kiu ĝi povu diskonigi la agadojn, kiujn ĝi entreprenas kaj la celojn, kiujn ĝi volas atingi.

Kompreneble, tio ne signifas, ke ĉiuj gravaj agadoj kaj ĝeneralaj strikoj devas esti gvidataj de centra komitato, nek ke ili devas disvolviĝi en atmosfero de militista disciplino. Tiaj kazoj povas okazi, sed plejofte la ĝeneralaj strikoj eksplodas spontane, en etoso de batalemo, solidaro kaj pasio, por rebati iun fifaron de la kapitalisma sistemo, aŭ por subteni kamaradojn. Tiaj strikoj disvastiĝas kiel fajro en ebenaĵo.

Dum la unua rusa revolucio la strikmovadoj travivis sinsekvon da sukcesoj kaj malsukcesoj. La plej sukcesaj strikoj estis ofte tiuj ne antaŭe deciditaj, dum ĝenerale fiaskis tiuj, kiujn decidis la centraj komitatoj.

Por unuiĝi en organizitan forton, la strikantoj dum la agado bezonas kampon, sur kiu ili interkonsentas. Ili ne povas ataki la fortikan organizon de la kapitalisma potenco, se ili ne

konstruas siavice forte strukturitan organizon, se ili ne konsistigas solidan blokon, unuigante siajn fortojn kaj siajn volojn, se ili ne agas akorde. Tie estas la malfacilo. Ĉar kiam miloj kaj milionoj da laboristoj konsistigas unuigitan organismon, ili povas esti plu direktataj nur de funkciuloj agantaj ilianome. Kaj ni konstatis, ke tiuj reprezentantoj tiam fariĝas la mastroj de la organizo kaj ĉesas enkarnigi la revoluciajn interesojn de la laboristoj.

Kiel la laborista klaso povas en siaj revoluciaj luktoj kunigi siajn fortojn en fortika organizo sen tute embarasiĝi en la burokratara marĉo ? Ni respondos tiun ĉi demandon, starigante alian : kiam la laboristoj kontentiĝas, pagante siajn kotizojn kaj obeante la gvidantojn, ĉu oni povas aserti, ke ili batalas vere por sia libero ?

Batali por la libero, tio ne signifas lasi la gvidantojn decidi onianome, nek sekvi ilin obeeme, eĉ se oni riproĉas ilin de tempo al tempo. Batali por la libero, tio estas plejeble partopreni mem, pensi kaj decidi mem, ekresponzi kiel persono, inter egalrajtaj kamaradoj. Veras, ke pensi per si mem, juĝi pri kio estas vera kaj justa, tio estas por la laboristo, kies spiriton lacigas la ĉiutaga laboro, plej malfacila tasko, multe pli postulema ol se li nur pagas kaj obeas. Sed ĝi estas la nura vojo al libero. Atendi sian liberigon fare de aliujoj, kiuj faras el tiu liberigo rimedon por mem superregi, tio simple estas anstataŭigi la malnovajn mastrojn per novaj.

Por atingi sian celon - la liberon - la laboristoj devos kapabli gvidi la mondon ; ili devos scii uzi la riĉaĵojn de la tero por fari ĝin akceptema al ĉiuj, kaj tion ili ne povos fari tiel longe dum ili ne scios batali per si mem.

La proletara revolucio celas ne nur detruiri la kapitalisman potencon. Ĝi postulas ankaŭ, ke la tuta laborista klaso eligu el sia dependeco kaj

malklero por atingi la sendependecon kaj por konstrui novan mondon.

La vera organizo, kiun bezonas la laboristoj en la revolucia procezo, estas organizo, en kiu ĉiu partoprenas, korpe kaj mense, tiel en la agado kiel en la gvidado, en kiu ĉiu pensas, decidas kaj agas, mobilizante ĉiujn siajn kapablojn - unuigita bloko el plene responsaj personoj. La profesiaj gvidantoj ne havas lokon en tia organizo. Kompreneble, necesos obei : ĉiu devos konformiĝi al la decidoj, kiujn li mem kontribuis formuli. Sed la tuta potenco ĉiam koncentriĝos en la manoj de la laboristoj mem.

Ĉu oni iam povos realigi tian organizon ? Kiun strukturon ĝi havos ? Ne necesas provi difini ĝian formon, ĉar la historio jam produktis ĝin : ĝi naskiĝis el la praktikado de l'klasbatalo. La strikkomitatoj estas ties unua formo, la pratipo. Kiam la strikoj fariĝas sufiĉe gravaj, ne plu eblas, ke ĉiuj laboristoj partoprenas saman asembleon. Ili elektas du delegitojn, kiuj ariĝas en komitaton. Tiu komitato estas nur la plenumilo de la strikantoj, ĝi estas en konstanta rilato kun ili kaj devas efektiviĝi la decidojn de l' laboristoj. Ĉiu delegito estas ĉiumomente eksigebla kaj la komitato ne povas fariĝi sendependa potenco. Tiel la tuta strikantaro certas esti unuigita en la agado samtempe konservante la privilegion decidi. Generale, la sindikatoj kaj ties estroj ekkaptas la gvidadon de la komitatoj.

Dum la rusa revolucio, kiam la strikoj intermite eksplodis en la uzinoj, la strikantoj elektis delegitojn, kiuj kunvenis nome de la tuta urbo, aŭ de la industrio, aŭ de la fervojoj de tuta provinco, kun la celo alporti unuecon en la batalon. Kiel unuan taskon, ili diskutis la politikajn aferojn kaj responsis pri la politikaj funkcioj, ĉar la strikoj es-

tis orientitaj ĉefe kontraŭ la carismon. Tiujn komitatojn oni nomis sovetoj, aŭ konsilioj. Oni tie pridiskutis detale la situacion, la interesojn de ĉiuj laboristoj kaj la politikajn eventojn. La delegitoj konstante iris kaj venis inter la asembleo kaj siaj uzinoj. Sialflanke, la laboristoj partoprenis ĝeneralajn asembleojn, en kiuj ili pridiskutis la samajn aferojn, faris decidojn kaj ofte elektis novajn delegitojn. Kapablajn socialistojn oni elektis kiel sekretariojn ; ilia rolo estis konsili, uzante siajn pli vastajn konojn. Tiuj sovetoj ofte rolis kiel politikaj fortoj, speco de primitiva registaro, ĉiufoje kiam la cara potenco estis paralizita kaj kiam la konsternitaj regantoj lasis al ili liberan kampon. Tiel ili fariĝis la konstanta centro de la revolucio ; ili konsistis el la delegitoj de ĉiuj uzinoj, strikantaj aŭ funkciantaj. Ili ne povis ekpensi iam fariĝi sendependa organismo, tial ĉar la membroj ofte ŝanĝiĝis ; foje, eĉ la tuta soveto estis anstataŭigita. Krome, ili sciis, ke ilia tuta potenco estas en la manoj de la laboristoj ; ili ne povis devigi ilin ekstriki, kaj iliaj alvokoj ne estis atentataj, se ili ne kongruis kun la instinktaj sentoj de la laboristoj, kiuj spontane sciis, ĉu ili troviĝas en forta aŭ malforta pozicio, ĉu estas tempo pasiĝi aŭ prudenti. Tiel la sovetsistemo montris, ke ĝi estas la plej taŭga organizformo por la revolucia laborista klaso. Tiun modelon oni tuj adoptis en 1917 ; la sovetoj el soldatoj kaj laboristoj stariĝis en la tuta lando kaj estis la vera motoro de la revolucio.

La revolucia graveco de l'sovetoj denove konfirmiĝis en Germanio, kiam, en 1918, post la diseriĝo de la armeo, kreiĝis soldataj kaj laboristaj sovetoj laŭ la rusa modelo. Sed la germanaj laboristoj, kiuj kutimis la partian kaj sindikatan disciplinon, kaj kies tujaj celoj modliĝis laŭ la socialdemokrataj idealoj pri respubliko kaj reformo, elektis siajn sindikatestrojn kaj siajn partiestrojn ĉe la kapo de tiuj sovetoj.

Ili estis kapablintaj batali kaj ĝuste agi per si mem, sed al ili mankis memfido kaj ili elektis por si estrojn saturitajn de kapitalismaj idealoj - kio ĉiam fuŝas la aferojn. Do ne estas surprizige, ke "soveto-kongreso" decidis abdiki favore al nova parlamento, kies balotado devis sekvi plejeble frue.

Ni klare vidas, ke la sovetsistemo povas funkcii nur kiam troviĝas revolucia laborista klaso. Tiel longe dum la laboristoj ne intencas daŭrigi la revolucion, al ili neniel utilas la sovetoj. Se la laboristoj ne estas sufiĉe progresintaj por malkovri la vojon al la revolucio, se ili kontentiĝas, vidante siajn estrojn zorgi pri ĉiuj paroladoj, ĉiuj peradoj kaj ĉiuj intertraktadoj celantaj akiri reformojn interne de la kapitalisma sistemo, tiam tute sufiĉas al ili la parlamentoj, la partioj kaj la sindikataj kongresoj - kiujn oni nomas ankaŭ "laboristaj parlamentoj", tial ke ili funkcias laŭ la sama principo. Male, se ili sin tute dediĉas al la revolucio, se ili partoprenas entuziasme kaj pasie ĉiujn eventojn, se ili pensas kaj decidas per si mem ĉiujn detalojn de la lukto, ĉar ĝi estos ilia propra verko, tiukaze, la sovetoj estas la organizformo, kiun ili bezonas.

Tio ĉi implicas ankaŭ, ke la sovetojn ne povas konsistigi revoluciaj grupoj. Ĉi-lastaj povas nur diskonigi tiun ideon, klarigante al siaj laboristaj kamaradoj, ke la luktanta laborista klaso devas organiziĝi per sovetoj. La naskiĝo de la sovetoj situas ĉe la unua agado revolucieca ; ilia graveco kaj iliaj funkcioj kreskas laŭ la disvolviĝo de la revolucio. Unuastadie, ili povas esti nur simplaj strik-komitatoj, konsistigitaj por lukti kontraŭ la sindikatestroj, kiam la strikoj transpasas ties intencojn kaj kiam la strikantoj rifuzas plu obei ilin.

Dum la ĝeneralaj strikoj pliampleksiĝas la funkcioj de tiuj komitatoj. Tiam la delegitoj de ĉiuj uzinoj havas kiel taskon diskuti kaj decidi pri ĉiuj kondiĉoj de la lukto ; ili devas klopodi por transformi la batalfortojn de la laboristoj en pripensitajn agadojn kaj vidi kiel ili povos reagi kontraŭ la registaraj decidoj kaj la faroj de la armeo kaj de la kapitalistaj klikoj. Dum la tuta striko la decidojn tiel faros la laboristoj mem. Ĉiuj opinioj, volo, disponebloj kaj hezitoj de la amasoj konsistigas nur unu tuton interne de la soveta organizo. Tiu ĉi fariĝas la simbolo, la interpretanto de la laboristara potenco ; sed ĝi estas ankaŭ nur la parolportanto revokebla ĉiumomente. Komence kontraŭleĝa organizo de la kapitalisma socio, ĝi fariĝas vera potenco, pri kiu devas kalkuli la registaro.

Ekde kiam la revolucia movado akiras tian potencon, ke ĝi vere endanĝerigas la registaron, la sovetoj fariĝas politikaj organoj. En politika revolucio ili enkarnigas la laboristan potencon kaj devas fari ĉiujn necesajn decidojn por malfortigi kaj venki la kontraŭanton. Same kiel militanta regno ili devas gardostari sur la tuta lando por ne pretervidi la strebadon de la kapitalista klaso por kunigi siajn fortojn kaj venki la laboristojn. Krome, ili devas prizorgi iujn publikajn aferojn, kiujn antaŭe prizorgis la Ŝtato : la sanon kaj la publikan sekuron, same kiel la interrompitan evoluon de la socia vivo. Fine ili devas ekprizorgi la produktadon, kio estas la plej grava kaj plej malfacila tasko de la laborista klaso en revolucia situacio.

Neniu socia revolucio komenciĝis kiel nura ŝanĝiĝo de politikaj gvidantoj, kiuj, konkerinte la regpovon, efektivigas per novaj leĝoj la necesajn sociajn ŝanĝiĝojn. La regonta klaso ĉiam konstruis, antaŭ kaj dum la lukto, la novajn organizojn, kiuj aperis el la malnovaj, kvazaŭ burĝonoj sur morta trunko. Dum la franca revolucio la nova kapitalista klaso, la civitanoj, la



aferistoj, la metiistoj, konstruis en ĉiu urbo kaj vilaĝo komunumajn asembleojn kaj justicejojn, kiuj, tiam nelegaj, nur uzurpis la funkciojn de la regaj funkciuloj fariĝintaj senpovaj. Kaj dum en Parizo la delegitoj de tiuj asembleoj ellaboris la novan konstitucion, tra la tuta lando la civitanoj laboris por la vera konstitucio, okazigante politikajn kunvenojn kaj starigante politikajn organizojn, kiuj poste estis leĝe agnoskitaj.

Kaj same, en la proletara revolucio, la nova regonta klaso devas krei siajn novajn organizformojn, kiuj, iom post iom, dum la revolucia procezo, anstataŭos la malnovan ŝtatan organizon. Kiel nova politika organizformo, la soveto fine anstataŭas la parlamentismon, politikan formon de la kapitalisma reĝimo.

La kapitalistaj kaj socialdemokratiaj teoriistoj samopinias, ke la parlamenta demokratio estas la perfekta modelo de la demokratio, konforma al la principoj de justeco kaj egalrajteco. Fakte, tio estas nur maniero maski la kapitalisman superregon, kiu ignoras ĉiun juston kaj egalrajtecon. Nur la sovetsistemo konsistigas la veran laboristan demokration.

La parlamenta demokratio estas malnoblega demokratio. La popolo povas elekti siajn delegitojn kaj voĉdoni nur unu fojon ĉiun kvaran aŭ kvinan jaron ; kaj ve al ĝi, se ĝi ne elektas la taŭgan homon ! La balotantoj povas uzi sian povon nur en la balotmomento ; la tutan ceteran tempon ili estas senpovaj. La elektitaj delegitoj fariĝas la gvidantoj de la popolo ; ili dekretas la leĝojn, starigas la registarojn, kaj la popolo nur obeu ! Generale, la balotmaŝino tiel funkcias, ke nur la grandaj kapitalistaj partioj, potence ekipitaj, havas ŝancon gajni. Tre maloftas, ke grupoj da veraj kontraŭstarantoj al la re-

ĝimo akiras kelkajn seĝojn.

En la sovetsistemo ĉiu delegito estas revok- ebla ĉiumomente. La laboristoj ja konstante ri- latas kun siaj delegitoj, partoprenante la dis- kutojn kaj decidojn, sed krome tiuj delegitoj es- tas nur portempaj parolportantoj de la sovetasem- bleoj. La kapitalistaj politikistoj ja facile po- vas denunci la rolon "sen karaktero" de la deleg- ito, kiu foje estas devigata eldiri opiniojn, kiuj ne estas la propraj. Ili forgesas, ke ĝuste tial ke ne estas dumviva delegito, estas elektitaj por tiu posteno nur la individuoj, kies opinioj estas konformaj al tiuj de la laboristoj.

La parlamenta reprezentado havas kiel bazprin- cipon, ke la delegito en la parlamento devas agi kaj voĉdoni laŭ sia propra konscienco kaj propra konvinko. Se foje okazas, ke li petas la opinion de siaj elektintoj, tio estas nur ĉar li montras sian prudenton. Al li sed ne al la popolo aparte- nas la respondeco de l'decidoj. La sovetsistemo funkcias laŭ inversa principo : la delegitoj sin limigas, esprimante la opiniojn de l'laboristoj.

La parlamentaj balotoj arigas la civitanojn laŭ ties balotdistrikto - t.e., laŭ ties loĝlokoj. Tiel, individuoj malsammetiaj aŭ malsamklasaj kaj kiuj havas nenion komunan, krom ke ili estas naj- baroj, estas arbitre arigitaj en grupon kaj re- prezentataj de ununura delegito.

En la sovetoj la laboristoj estas reprezent- ataj en siaj devengrupoj laŭ la uzino, la labor- ejo aŭ la industria fako, en kiu ili laboras. La laboristoj de iu uzino konsistigas produktadunuon; ili konsistigas tuton pro sia kolektiva laboro. En revolucia periodo ili do povas tuj interrilti por interŝanĝi siajn vidpunktojn : ili vivas laŭ samaj kondiĉoj kaj havas komunajn interesojn. Ili devas agi kune ; decidu ili, ĉu la uzino, kiel unuo, devas striki aŭ funkcii. La organizado kaj la delegado de l'laboristoj en la uzinoj kaj la- borejoj estas do la nura ebla formo.

Samtempe la sovetoj estas garantio pri la leviĝo de l'komunismo en la revolucia procezo. La socio havas la produktadon kiel fundamenton, aŭ, pli ĝuste, la produktado estas la esenco mem de la socio, kaj, sekve, la funkciado de la produktado determinas la funkciadon de la socio. La uzinoj estas laborunuoj, ĉeloj, konsistigantaj la socion. La ĉefa tasko de l'politikaj organismoj (de kiuj dependas la pluirado de l'socio) estas strikte ligita kun la produktiva laboro de la socio. Estas do memkompreneble, ke la laboristoj, en siaj sovetoj, pridiskutas tiujn aferojn kaj elektas siajn delegitojn en siaj produktadunuoj.

Tamen, estus eraro diri, ke la parlamentismo, politika formo de l'kapitalismo, ne estas fondita sur la produktado. Fakte, la politika organizo estas ĉiam modlita laŭ la karaktero de la produktado, fundamento de la socio. La parlamenta reprezentado, kiu estas determinita laŭ la loĝloko, apartenas al la sistemo de la eta kapitalisma produktado, en kiu ĉiu homo devas posedi sian etan entreprenon. Tiukaze, ekzistas rilato inter ĉiuj aferistoj de iu distrikto : ili komercas inter si, vivas kiel najbaroj, konas unuj la aliajn kaj sekve elektas komunan parlamentan delegiton. Ni vidis, ke tiu sistemo montriĝis poste la plej bona por reprezenti la klasinteresojn interne de l'kapitalismo.

Aliflanke, ni klare vidas hodiaŭ, kial la parlamentaj delegitoj devis ekkapti la politikan potencon. Ilia politika tasko estis nur eta parto el la socia verko. La plej grava, la produktiva laboro, koncernis ĉiujn apartajn produktantojn, tiel la civitanojn kiel la aferistojn ; ĝi postulis ilian preskaŭ tutan energion kaj iliajn zorgojn. Kiam ĉiu individuo zorgis pri la propraj aferetoj, tiam la socio bonfartis. La ĝeneralaj leĝoj, necesaj sed malmulte trafaj kondiĉoj, povis esti lasitaj

en la manoj de fakgrupo (aŭ profesio), la politikistoj. La inverso veras pri tio koncernanta la komunisman produktadon. La kolektiva laboro produktiva fariĝas la tasko de la tuta socio, kaj koncernas ĉiujn laboristojn. Ilia tuta energio kaj iliaj tutaj zorgoj servas ne personajn taskojn sed la kolektivajn verkojn socian. Kaj la regularoj, kiuj regas tiun kolektivajn verkojn, ne povas esti lasitaj en la manoj de fakgrupoj ; ĉar de tio dependas la ĉefintereso de la tuta laboristaro.

Ekzistas alia diferenco inter la sistemoj parlamenta kaj soveta. La parlamenta demokratio donas voĉon al ĉiu plenkreskulo - kaj foje al ĉiu virino - elvokante la superan kaj netuŝeblan rajton de ĉiu individuo aparteni al la homa raso, kiel tiel bone diras la ceremoniaj paroladoj. Male, en la sovetoj, nur la laboristoj estas reprezentataj. Ĉu oni konkludu, ke la sovet-sistemo ne estas vere demokratia, tial ke ĝi ekskludas la aliajn soci-klasojn ?

La sovetorganizo enkarnigas la proletaran diktaturon. Antaŭ pli ol duonjarcento, MARKS kaj ENGELS klarigis, kiel la socia revolucio devis konduki al la proletara diktaturo kaj kiel tiu nova politika esprimo nepre necesas por enkonduki necesajn ŝanĝojn en la socion. La socialistoj, kiuj pensas nur per terminoj de parlamenta reprezentado, provis ekskuzi aŭ kritiki tiun malobeon al la demokratio kaj la maljustaĵon, kiun oni kulpas, rifuzante la voĉdonrajton al iuj personoj pretekste, ke ili apartenas al malsamaj klasoj. Ni povas vidi hodiaŭ kiel la procezo de la klasbatalo nature naskas la organojn de tiu diktaturo : la sovetojn.

Estas neniel maljuste, ke la sovetoj, lukto-organoj de revolucia laborista klaso ne enhavu reprezentantojn de la malamika klaso. En naskiĝanta komunisma socio ne estas loko por la kapitalistoj ; ili devas malaperi kaj ili malaperos. Kiu ajn, partoprenanta la kolektivajn laboron, estas membro de la kolektivo kaj partoprenas la

decidojn. La individuoj, kiuj restas ekster la kolektiva procezo de l'produktado, estas, pro la strukturo mem de la sovetsistemo, aŭtomate ekskluditaj el la decidoj. Tiuj restantaj el la malnovaj ekspluatistoj kaj ŝtelistoj ne havas voĉon en la kontrolado de l'produktado.

Ekzistas aliaj sociklasoj, kiujn oni ne povas klasi kun la laboristoj nek kun la kapitalistoj : la etfarmistoj, la sendependaj metiistoj, la intelektuloj. En la revoluciaj luktoj ili balanciĝas de dekstro al maldekstro, sed en sia tuto ili malmulte gravas, ĉar ili havas malmulte da potenco. Malsamas ĉefe iliaj organizformoj kaj iliaj celoj. La luktanta laborista klaso devos amikiĝi kun ili aŭ ilin neŭtraligi - kaj tio eblas sen forgesi la verajn celojn - aŭ ankaŭ, se necese, rezolute kontraŭbatali ilin ; ĝi devos decidi pri la plej bona maniero trakti ilin, firme sed ankaŭ juste. Laŭmezure kiel ilia laboro estas utila kaj necesa, ili trovos sian lokon en la produktad-sistemo kaj tiel povos influi laŭ la principo, ke ĉiu laboristo havas voĉon en la kontrolado de l'laboro.

ENGELS skribis, ke la Ŝtato malaperos kun la proletara revolucio ; ke la administrado super la aferoj sekvos la regadon super la homoj. En tiu epoko, ne eblis klare ekvidi kiel la laborista klaso kaptos la regpotencon. Sed ni havas hodiaŭ la pruvon pri la pravo de tiu vidpunkto. En la revolucia procezo la malnova ŝtata potenco estos detruita kaj la organoj, kiuj anstataŭos ĝin, la sovetoj, certe ankoraŭ kelkatempe havos gravajn politikajn povojn por kontraŭbatali ĉiujn spurojn de la kapitalisma sistemo. Tamen, ilia politika funkcio progresive reduktiĝos al simpla ekonomia funkcio : organizi la procezon de la kolektiva produktado de la socie necesaj bonaĵoj.

A. P.